
LEG
La « Espéranto-Gironde » Informilo

NOVEMBRO 2010

N° 125



# ĜENERALA ASEMBLEO EN HURE LA 18an DE SEPTEMBRO 2010




*Fotis René*

**ĜENERALA ASEMBLEO**
**LA 18an de Septembro 2010**
**En HURE ĉe geGUILLAUME**

La kunsido komencas je la 11ª horo kaj 25 mn

**Ĉeestis** : Joël – Louisette – Christiane J. – Michel J. – Jean Claude - Yannick – Janine – Jean Luc - Micheline – Bruno - Danièle - Rose – Maeva – René - Monique – *xxxxxxxxx* - - Sabine -Laura

**Senkulpigitaj** : Marcel – Claudine – Michel – Violette – Bernard - Marie Hélène – Jean Seb -

La bela vetero ebligis tiun renkonton ekstere en la bela ĝardeno de geGuillaume, post amika vizito ĉe la tri azeninoj de la hejmo.

René malfermis la kunsidon per la taga programo. Tiucele, li donacis al ĉiu libreton pri urbo La Réole, de li tradukitan en esperanto.

**Agadraporto far Joël**

**11-12/09/2009** : Forum à Sadirac – Michel deĵoris ĉe budo.

**24/09/2009** : Atout-Langues - Jean-Seb deĵoris ĉe budo kaj prezentis Es peranton al kolegio-lernantoj kun la helpo de Joël, Jean-Claude kaj Bernard.

**06/12/2009** : Zamenhof-Tago en Libourne, kun prezento de bordoza grupo historio far Marcelo, kaj muzika posttagmezo.

**24/01/2010** : vizito de du japanoj : Yasuo kaj Bin, kiuj turneas en Francio. Agrabla tago dum kiu ni lernis pri Japanio, pri tutmonda muziko, kaj pri hietori terapio. (Janine rakontis ke ŝi spertis, sukcese, kelkajn iliajn konsilojn).

**31/01/2010 :** Brazilanoj vizitis kelkajn membrojn en Libourne.

**01/04/2010 :** Post la invito de Bernard, Joël prezentis Esperanton en la mediateko de Le Haillan kie staris ekspozicio pri la internacia lingvo.

**18/04/2010** : Printempa renkonto denove en Libourne. Janine kaj Yannick prenzentis, bilde, la pasintan U-Kongreson de Byalistok

**06/06/2010 :** dua pieda ralio en Galgono, kiu renkontis la saman sukceson ol la unua.

**20/06/2010 :** jarfina tago en Blaye kun vizito de la Nova Insulo m e z e de Ĝirondo.

## Financa raporto far la kasistino

44 kotizintoj al Espéranto-Gironde (46 en 2009)
5 abonintoj al Laùte (6 en 2009)
14 aliĝintoj al SAT-Amikaro (15 en 2009)

Enspezoj (de la 01/01 ĝis la 18/09/2010) …. 1 852,61 €
Elspezoj " " …. 1 795,79 €
Bilanco ………………………………………. 56,82 €
Ŝparkaso …………………………………….. 5 055,37 €

La kotizoj por 2011 estas senŝanĝaj :
- individua kotizo …………….. 17 €
- para kotizo ………………… 23 €

Denove neniu kandidato prezentiĝas por plifortigi la duopan skipon de la estraro. Tamen utilaj konsiloj helpos Monique, kiu zorgas ĝis nun sola por la diskonigo de LEGI, 5 ĉi-jare. (Ne estas normale ke nur unu persono zorgas pri tiu laboro. Devus esti skiplaboro

Ekzemple, sendi rete la libreton, tio kiu malplipezigus la poŝtkostojn. Kompreneble ĝi daŭrige estos sendita poŝte al tiuj kiuj ne posedas retadreson.

Monique ankaŭ petas de la legantoj ke ili sendu artikolojn, (jam korektitajn), fotojn, aperigontajn en Legi.

Monique dankas Bruno, kiu proponis sian helpon.

Joël multe dankas Monique pro ŝia peza laboro por prepari kaj sendi nian gazeton.

**La kursoj**

En Galgon : 12 lernantoj laboras 2 horojn semajne, ĉiu vendredo de la 18ª horo ĝis la 20ª horo

En Sainte Foy la Grande : Ŝajnas ke tiu kurso renkontas malfacilaĵojn por daŭrigi.

En Cenon : Ĉiun lundon, de la 14ª horo ĝis la 17ª horo. La unua parto estas rezervita por komencantoj (ĝis 4 pasintjare) ; dum la dua parto la tradukadoj daŭrigas inter la kvar progresantoj.

En St André de Cubzac, Louisette havas kontakton kun juna lernanto, 8 jara, volanta lerni la lingvon, same kiel sia perigorda avino.

En Montendre : la kursoj bonorde okazas kun 10 lernantoj.

**Venontaj agadoj** :

**19/11/2010 * :** Vizito de Sr Miyoshi, la persono kui ĉiujare aperigas anoncojn en "Le Monde", pri Esperanto. Joêl zorgas pri lia veno, kaj pliaj detloj aperigos poste.

**19/12/2010** : la dato de nia venonta festo ZAMENHOF-tago. Eble kun partopreno de alia asocio. Pliaj detaloj aperigos poste.

**09/04/2011** : Janine parolas pri evento okazonta en Saint Ciers sur Gironde, prezento de Esperanto en la Mediateko, la urbestrino estante favora al nia movado. Esperanto Gironde estas invitita alportante sian materialon, flugfolioj, paneloj …

**24 kaj 25/04/2011 :** Inter asiociaj esperantaj kongreso en Sète. La frisa grupo Kapriolo, kantos dum tiu renkonto. Ĉar, alvenante, ĝi trapasos nian regionon, halto eblos en Bordozo. La dato estos la : 20ª de aprilo 2011.

Laŭra parolas pri artikolo aperigita en Sennaciulo koncerne Esperanto kaj Framasonismo. René sin proponis por ĝin traduki en la franca.

Bruno esperas daŭrigi la kursojn kiujn li donis al kvar universitatinoj pasintjare, kaj konduki ilin ĝis la unuagrada ekzameno.

* ***Lasta minuto : Sr Miyoshi ne venos en nia regiono dum tiu periodo***

Post la pikniko, ĉiam tre abunda, Sabine disdonas al ĉiuj, kiel ĉiu jare, vinberojn el sia vitejo, la vinberrikolto estante jam komencita.

Poste, René rakontis al ni, ĉirkaŭ la preĝejo Saint Martin en Hure, la malkovron de gallioromiaj mozaikoj kies postrestaĵoj estas konservataj sur muro de la ŝirmkorto de la lernejo. Certe la preĝejo, la ĉirkaŭaj domoj estas konstruitaj sur tiuj mozaikoj, kiuj apartenis al gallioromia vilao.

Poste ni veturis ĝis la bela vilaĝo *Meilhan sur Garonne,* en de la departemento *Lot et Garonne*, kies teralto superstaras Garonon kun ĝiaj meandroj, ĝia grandega valo, kaj la kanalon de la "du maroj" (atlantika oceano kaj meditareneo).

Superbela panoramo !!

Bedaŭrinde tempo mankis por vagi en *La Réole* ……

Belega tago, amika renkonto.

Ĝis la venonta !

*Monique kaj Joël*

Manĝo sub la suno



*Fotis René*



MEILHAN SUR GARONNE

*El la reto ......*

95a Universala Kongreso de Esperanto

Havano, 17–24 julio 2010

## Kubo : la danc-kongreso.

Do, nia unua UK estas nun post ni. Ni iris kuben kun la pariza karavano por la antaù-kongreso, kaj ni vizitis la okcidentan parton de Kubo, ĝis Pinar del Rio. Ni estis tre amika grupo po 24 personoj, el kiuj estis kvinopo de Esperanto-Gironde : tri Sarlandie kaj la ge-Dumoulin.

Ni renkontiĝis en flughaveno Charles de Gaulle, kaj nia triopo estis ege bonŝansa : ni flugis en « Classe affaires », kun granda loko, diversaj elektoj por la tagmanĝo, kaj kvazaù lito kun dors-masaĝo dum la vojaĝo !

Post flugo je 9 horoj, ni finfine alvenis en Havano, kie ni estis akceptitaj de Marta, iu ĉiĉerono kiu parolis la Francan ; do dum unu semajno ni krokodilis.

La unuan nokton ni trapasis en Hotel Presidente, kiu estis konstruita antaù la mondmilito, kaj la sekvontan matenon ni denove enbusiĝis por iri al Soroa. Tie, ni vizitis las Terrazzas, socia vilaĝo enskribita ĉe Unesko. Kiel la antaùa tago, ni estis akceptitaj kun muziko kaj cokteloj. Ni tagmanĝis en restoracio, kiu iam estis la domo de franca kafo-plantisto, kaj restis dum du noktoj en motelo kun bela naĝejo.

La sekvanta etapo estis Pinar del Rio, kie ni vizitis fabrikon de cigaroj ene de pasinta karcerejo. Tie ni vidis labori, junaj kaj maljunaj, viroj kaj virinoj de tutaj la haùt-koloroj. Estas ekzemple ke diskriminacio malaperis en Kubo okaze de la revolucio. Ni daùrigis nian vojaĝon ĝis Viñales por du noktoj pli.

Estis jam tempo por reveni Havanen, sed ni trairis ŝipe ĝis Cayo Levisa, belega insulo kie la ŝoforo de la aùtobuso ne povis veni, ĉar li ne havis pasporton, kaj kelkcentoj da kilometroj fronte kuŝas Florido !

Fine de la tago, ni alvenis al Hotelo « Palco » ĵus apude la kongresejo. La sekvontan matenon, kvinopo (mi kaj 4 virinoj) estis promenintaj. Mi konstante fotis ĝis kiam unu viro alveninta de malantaùe perforte prenis mian fotilon kaj rapide foriris. Mi kuris post li, sed li estis pli rapide ol mi, kaj saltis super du muroj. Mi informis la hotel dungitaro ĉar mi intencis plendi ĉe la polico, esperante pri la asukareco. Sed, dum la posttagmezo devus okazi la vizito de maljuna Havano. Do, finfine policisto alvenis je la 19a, kaj ĉio glatis, helpe de franc-parolanta dungistino kaj de hispanparolanta kongresanino. Ni vespermanĝis je la 22.45.

Venontan matenon ni partoprenis en la solena inaùguro. Longa sed deviga ceremonio, kiam la Usona delegitino estis tre longe aplaùdita, ĉar venanta Kuben, ŝi riskis punon.

Poste, mi iris al la « Ĝemelaj urboj », animata de nia japana amiko HORI Jasuo, sed neniu grava okazis tie : ni estis ne plu ol deko da partoprenantoj.

Sekvante ni iris al nia unua danckurso, organizata de la junaj kubanoj. Tre agrabla etoso, sekvita de la kabaredo, kie la grupo ***Amindaj*** konigis al ni tradiciajn kubajn kantojn tradukitajn en esperanto.

Finfine ni busis ĝis la Teatro Mella en la urbocentro por tre ŝatata Nacia Vespero. Ja la kongreso komencis rapidege !

Lundon matene, ni ekskursis *Laù la vojo de Hemingway* : iomete desaponta ĉar ni ne povis viziti « El Floridita », la trinkejo kie la aùtoro trinkis siajn dajkirojn. Posttagmeze, denove la danckurso kaj la kabaredo, pli internacia tiutempe. La oficiala bankedo okazis ĉi-nokte, sed ni estis tro malfruaj por ĝui coktelon.

Mardon, la tuttaga ekskurso kondukis nin al Guama, loko kie estas montrita la vivo de la unuaj loĝantoj : la Taïnoj. Kaj reveninte, ni vizitis la bredejon de la krokodiloj. Bedaùrinde, neniu el la buso volontis por iri ĝis la « golfeto de la porkoj ». Ni decidis ne iri al teatro ĉi-nokte.


Merkredon, la kongreso estas fermita. Denove, tuttaga ekskurso : ni iris al Varadero, supozeble la plej bela strando en la mondo. Ege desaponta : ni preferis bani nin en naĝejo de la hotelo kie ni tagmanĝis. Granda eksperimento vespere : ni spektaklumis en la havana***Tropicana,*** fama teatro sub ĉielo, kie ni estis bonvenigitaj per « Bonan vesperon » !

Jaùdon estis ankaù plenplena tago : unue mi aùskultis la **Oratoran konkurson,** dedicitaj al junuloj ; mi povas diri, ke la ses kandidatoj el kvin kontinentoj efektive majstris la lingvon. Pli malfrue mi aùdis ege interesan konferencon pri la sanstato en Kubo, tuj antaù teatraĵo far de maljuna kubana artistino. La tago ne estus kompleta sen la danckurso kaj la kabaredo de la posttagmezo. Kaj ni finis nian tagon per kanonpafado : ĉiutage, je la 9a vespere, oni pafas kanonon por indiki ke la urbo kaj la haveno estos nun fermitaj. Tre « turista » ekskurso, sed de la orienta parto de Havano, ni havas belan vidon sur la urbo, specife la maljunan Havano. Finfine ni vespermanĝis ĉe « Los dos Hermanos » restoracio ĉe la kajo de la haveno.

Iom post iom, la kongreso alproksimiĝis al sia fino. Vendredon matene mi partoprenis paroligan kurson kaj en la posttagmezo Jacques YVART, akompanita de Fabrice, koncertis. Dum la vespero ni estis invititaj de familio de kamaradino de Estelle, kiuj ne parolis esperanton. Feliĉe ili ankaù invitis najbarinon edzigintan en Francio, do ni havis tradukantinon ! Ni estis tre bonvenaj ĉe ili, kiuj ni neniam vidis antaùe. Ni foriris kun promeso reveni !

Sabaton matene : solena fermo, kaj sabaton vespere : hejmvojaĝo.

Estis nia unua universala kongreso ; Estelle konsciis, ke junuloj vere parolis esperanton, kaj ke ĝi funkcias ; Rose decidis plibonigi sian lingvo-nivelon por iri al Kopenhago venontan jaron ; mi preferus viziti Hanojon en 2012…Do, eble ambaù ?



***Bernardo***

# ĈI–SOMERE, EN PLUEZEKO!...

Ni estis ses ! Ses MEG-anoj (MEG = Montendre Esperanto Grupo), kiuj veturis ĉi-somere al Pluezeko. Ni partoprenis en la 14-a Esperanto-Renkontiĝo, kiu okazis en tiu ĉarma vilaĝo de Bretonio. Tiu Renkontiĝo estas samtempe staĝo kaj kongreseto :

- De staĝo, ĝi havas la ege seriozajn kursojn. Estis ses kursoj por plenkreskuloj kaj unu por infanoj. Gvidis la kursojn kelkaj eksterlandanoj : Stephan Mc Gill el Nov-Zelando, Perla Mielo el Hungario, Barbara Pietrzak el Pollando, Peonio Nian el Ĉinio kaj kelkaj Francoj : Michel Dechy, Anne kaj Claude Jausions. Ni laboris por plibonigi nian Esperanton de la 9-a ĝis la 12-a, dum ses tagoj. Kaj, de la 17-a ĝis la 19-a, ni laboris pere de Esperanto, en diversaj atelieroj : ĥorkanto, teatro, jogo, informatiko, eklernado de la ĉina lingvo…

- De kongreso, tiu Renkontiĝo havas la « solenan malfermon », kun paroladoj de gravuloj (eĉ la urbestro de Pluezeko parolis), la « interkonatiĝan vesperon », la « vesperajn aranĝojn ». Ni ĉeestis plurajn prelegojn prezentitajn de alilandanoj (el Nepalo, Brazilo, Pollando). Ni ĉeestis koncerton en la preĝejo de Pluezeko. Ni partoprenis en bretonaj dancoj : tri muzikistoj, kun siaj sakflutoj tre ĝoje dancigis nin. (Tiu vespero estis tre amuza kaj venis kun la esperantistoj multaj enloĝantoj de la vilaĝo mem.) Mi ŝatis ankaŭ la adiaŭan vesperon, dum kiu ĉiu laborgrupo prezentis kantojn, skeĉojn, dancojn aŭ teatraĵojn ; eĉ la grupo de volontuloj, kiuj antaŭ kaj dum la staĝo multe laboris por prepari ĉion kaj zorgi pri la bona disvolviĝado de la Renkontiĝo, eĉ tiu simpatia grupo kun granda bona humoro kuntrenis nin ĉiujn en viglajn dancojn… Fine, ankaŭ de kongreso la Renkontiĝo havas la ekskursojn : ĉiutage ni vizitis etajn vilaĝojn de fiŝkaptistoj, kapelojn, muzeojn ktp.

Mi forgesis precizigi ion : en tiu staĝo partoprenis 135 personoj. Mi devas konfesi, ke ni finis la staĝon iomete lacaj sed ege kontentaj ! Mi esperas, ke venontan jaron mi denove vizitos Pluezekon, eble kun geamikoj el Montendre kaj, kial ne? kun geamikoj el Bordozo.

***Christiane J***

# FAJRO EN « BONA ESPERO »

Fine de la somero, incendio domaĝegis grandan parton de la regiono Alta Paraiso, Brazilo. En tiu regiono situas la centro **Bona Espero**, akceptejo por infanoj, junuloj, kiuj ne ricevas normalan edukadon : orfaj, forlasitaj, malriĉaj. La enlernejigo estas la ĉefa agado, sed la bieno ankaŭ provizas nutradon por la infanoj kaj la edukistoj.

Kuiristino kaj kultivisto estas sajlaritaj de la centro ; du profesoroj estas pagitaj de la brazila ŝtato ; ĉiuj aliaj estas propravolaj, same kiel **Ursula kaj Guiseppe Grattapaglia** kiuj estras la centron de post 35 jaroj.

Guiseppe kaj Ursula vizitis la esperantistan semajnon en ***Plouezec*** dum aŭgusto 2010, kies asocio "Terre d'Espoir" (Tero de Espero), same kiel la Internacia Rotary, helpas ilin de pluraj jaroj.

***"La plej grava prioritato estas plej rapide rekonstrui la nordan limon de nia bieno pro diversaj kialoj ; ĉefe ke ni riskas invadon kaj, se ne estas la klara difino de la limo, ni povus perdi valoran terenon kaj ĉefe la fonton de nia lago. Bona Espero posedas 943 hektarojn, do preskaŭ 10 kvadratajn kilometrojn kaj tute ne eblas protekti la tutan teritorion. Sed estas almenaŭ 4 lokoj, kiujn ni devas bone prizorgi, ĉar la valoro de grundo kreskas, kaj multaj homoj fuĝas el la urboj kaj volas aĉeti grundon. En pluraj areoj ni havas naturajn limojn per riveretoj kaj ne urĝas meti fostojn. Sed ekzistas leĝo, en Brazilo, laŭ kio povas instali vin ie ajn, kaj se dum unu jaro kaj unu tago neniu protestas, vi rajtas peti la posedon de tiu grundo"***

***(eltiraĵo de mesaĝo sendita de Guiseppe kaj Ursula Grattapaglia)***

Se vi deziras helpi BONA ESPERO per donaco, kontaktu :
r-eon@orange.fr

## ZAMENHOF – TAGO EN MONTENDRE

## DIMANĈON LA 19an DE DECEMBRO

***************************

**Ĉiujare**, dum Decembro, la tutmonda esperantistaro festas la aŭtoron de la internacia lingvo . Pasintjare, ni organizis tiun-ĉi feston en Galgono ; ĉi-jare, niaj montendraj amikoj akceptos nin. La programo estos jena :

10H30 : Akcepto en la kulturcentro, apud la urbo-domo ; ni interkonatiĝos kun ĉarentiaj samideanoj.

11H – 12H : surprizo

POR TAGMANĜI , NI PIKNIKOS

Ĉiuj kunportos sian korbon ; sed nia amiko Ivano – la kuiristo de la galgona grupo- preparos por ni **varman kaj bongustan supon** nomitan « Garbur » ;

Ĝi entenas legomojn kaj porkviandon. Sed, por la vegetaranoj, estos, eventuale, legomsupo.Ne forgesu la supteleron kaj la kuleron !

Verŝajne, ni povos prepari surloke,kafon, teon aŭ tizanon.

**POSTTAGMEZE,** estos kantoj, magiaĵoj kaj muziko ; iu montendra muzikinstruisto ludos gitaron por ni kaj kantos en la franca.

NEPRE NOTU TIUN DATON !!... kaj venu multnombraj por praktiki Esperanton en simpatia etoso !!

Se vi intencas partopreni, BONVOLU INFORMI JOËL, ĉu per la reto « lajus.joel@wanadoo.fr , ĉu per telephono : 05.57.69.26.96

Dankon kaj ĜIS DECEMBRO !

Joël

# ESTRARO
# de
# « ESPÉRANTO-GIRONDE »

* * * * * * * *

Centre Culturel  Château Palmer
33150 CENON
Banque Postale :
347771 F Bordeaux

******************


Prezidanto : Joël LAJUS
1 Les Places
33910 SABLONS DE GUITRES
Tel : 05 57 69 26 96
Mail : lajus.joel@wanadoo.fr

Sekretario : vaka posteno

Kasistino : Monique DUSSENTY
76 avenue La Fontaine
33560 CARBON BLANC
Tel : 05 56 06 74 49
Mail : monique.duss@free.fr